

# Raportas Kubo 7 novajn kazojn de Covid-19 kaj neniun forpason



Havano, jun 17 (RHK) La nacia direktoro pri epidemiologio de la ministerio de publika sano de Kubo, dro. Francisco Durán, informis hodiaŭ ke je la fermo de tiu ĉi mardo, oni konfirmis 7 novajn kazojn pozitivajn de Covid-19 por totalo de 2280 personoj kaj neniun forpasinton.

Je sama dato, estas enhospitaligitaj por kontrolo epidemiologia 389 pacientoj. Aliaj 824 personoj estas kontrolataj hejme tra la baza sanato.

En tiu tago oni analizis 2320 samplajn, el kiuj 7 estis pozitivaj kaj la lando jam akumulas 141 151 studitajn samplajn kaj 2280 pozitivajn.

La novaj kazoj konfirmitaj estis kubanoj. El ili 5 estis kontaktoj de konfirmitaj kazoj. El ĉiuj konfirmitaj kazoj 88,8% estas kontaktoj de antaŭaj pozitivaj dum 160 el la kazoj venas el eksterlando. El la totalo konfirmita 53,6% estis sen simptomaj.

El la novaj kazoj 2 estis viro por 50,5% el la totalo. El la 2280 pacientoj diagnozitaj, 195 restas enhospitaligitaj kiel aktivaj kazoj. La nombro da forpasintoj entute estas je 84, kun indikilo de morteco je 3,68% sub la nivelo de la amerika regiono. Kubo restas je la pozicio 18 rilate la mortec-indikilon en la regiono. Restas la nombro da du eksterlandanoj evakuitaj al siaj respektivaj landoj kaj 1999 jam rekuperiĝintaj (5 pliaj hieraŭ?). Unu paciento estas en kriza stato kaj 4 en grava stato.

Ĝis sama dato la mondo akumulas pli ol 8 milionojn da kontaĵitoj pro tiu ĝi malsano kun indikilo de morteco je 5,46 % dum la amerika regiono havas proksimume 49,0% el ĝiuj kazoj en la mondo. La nombro da konfirmoj estas pli ol 3 milionoj. La nombro da forpasintoj en la regiono montras indikilon de morteco je 5,26%.

Spite al la favora evoluo de la malsano en Kubo la aŭtoritatoj insistas pri la bezono plu gardi la socian izoliĝon por eviti revigliĝon de la nova kronviruso. Pri tio la havanaj aŭtoritatoj pli strikte kontrolas la sekurecajn regulojn epidemiologiajn.

En 13 kubaj provincoj oni ne raportis kazojn dum la lastaj du semajnoj kaj pro tio la kuba registaro informis pri komenco de rekuperiĝa etapo en tiuj provincoj, escepte en Havano kaj Matanzas, la solaj, kiuj daŭre raportas kazojn de Covid-19.

---

<http://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/225962-raportas-kubo-7-novajn-kazojn-de-covid-19-kaj-neniun-forpason>



**Radio Habana Cuba**